



# LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 435<sup>2</sup>

Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55

Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

## NOVA JARO - NOVA KOMENCO.

La novan jaron „La Juna Vivo“ eniras en nova vesto, aŭ plibone dirite, en renovigita vesto. Post funda diskutado la estraro decidis ree presigi nian organon, kvankam en pli simpla formo ol antaŭe kaj provizore nur 8 paĝa.

„La Burĝono“ ne plu aperos kiel aparta eldono, spacomanko devigis nin fari tiun decidon. Sed aliflanke ni adaptos la enhavon de la eksteraj paĝoj al la kompreno kaj intereso de niaj aspirantaj membroj, tiel ke ili tamen havas parton de la organo.

Mi komprenas, ke post la stencilitaj bultenoj ĉi tiu gazeto vekos ĝojon ĉe la membroj, ĝi pruvas, ke efektive nia organizo resaniĝas. Sed spite de tio ni ankoraŭ baraktas kun tre grandaj malfacilaĵoj. La reordigo de la administracio ankoraŭ ne estas tute preta, pli intensiva kunlaborado

de la perantoj el multaj landoj estas nepre necesa.

Ankaŭ finance la aperigo de L.J.V. ne estas plene certigita. Provizore ni disponas pri sufiĉe da mono por certigi la eldonon de tri numeroj, sed kion poste? Nepre devas veni mono de la eksterlandaj perantoj al Nederlando.

Kiam ni decidis ree presigi L.J.V., ni sciis, ke eble post kelkaj monatoj ni ree devos ĉesigi la eldonadon. Tamen ni presigis, fidante ja la aktivado de la membroj. Komencu la novan jaron per nova energia aktivado por T.E.J.O. Pagu, se vi ne faris tion, tuj vian kotizon kaj varbu novajn membrojn kaj abonantojn. Nur per komuna fortostreĉado ni povas savi nian organon kaj organizon.

Roel Kraefft, prezidanto.

Kiam ajn mi aŭdas iun diri, ke „kompreni estas pardoni”, tio memorigas min pri la tragedia stato de BOZO, la cirka elefanto, kiu estis kondamnita al morto antaŭ kelkaj jaroj.

Antaŭe, BOZO ĉiam bone konduktis, kaj infanoj amis lin. En la meza cirka rondo li valsadis, kuŝigadis kaj ŝajnigadis sin mortinta, kaj dum la granda finalo, li direktadis la orkestron per flago. Sed ne nun. Trifoj dum unu semajno, li penis mortigis sian gardiston. Li muĝis kolere al la geknaboj, kiuj posedis arakon kvazaŭ plaĉus al li piedpremi ilin. Nenio povis trankviligi lin. La aŭtoritatoj diris al liaj posedantoj, ke ĉar li estas minaco al la publiko, ili devos mortigi lin.

Tiutempe, multaj urboj ne havis societon por la malebligado de krueleco al bestoj, kaj do, neniu malhelpis al la direktoro kompensi la perdojn per la vendado de biletoj, por ke la homoj rigardu la ekzekuton de BOZO.

Homamasoj plenigis la ĉefan tendon sabaton, en la mateno, kaj vidis amason da militpafiloj kaj atendantan aron da pafistoj. BOZO, en granda rondo kaĝo ĉirkaŭmarŝadis. Dume li levis sian rostron kaj muĝis kvazaŭ li bone scias tion, kio okazos.

Ekster la kaĝo, la rondmastro kun brila cilindra ĉapelo kaj baskoj pretigis sin por signali al la pafistoj, kiam oni metis manon sur la ŝultron de la direktoro. „Ĉu vi ne preferus teni la elefanton vivanta?” demandis la nekonato. „Neniu ŝanco”, diris la direktoro. „Li estas malbona elefanto, nenio povas bonigi lin nun”.

„Permesu, ke mi eniru la kaĝon kaj post du minutoj mi pruvos, ke vi estas malprava.” La estro sopire rigardis la nekonaton, kiu estis malalta dika viro kun nerimarkindaj brunaj lipharoj, okulvitroj kun dikaj lensoj, kaj bruna bula ĉapelo.

„Vi estus hakaĵo post tri minutoj” li diris. „Mi opiniis, ke vi diros tion”, la malgranda viro ridetis. „Do, mi alportis leĝan liberigon por vi. La tuta risiko estas mia.”

Certiginte sin, ke la dokumento estas laŭleĝa, la direktoro turnis sin kaj diris la sensacian novaĵon al la ĉeestantaro. Vigle, la nekonato demetis ĉapelon kaj palton. „Nun” li diris trankvile „vi povas malfermi la pordon.”

BOZO haltigis sian senĉesan vagadon, turnis sangstriaĵajn okulojn al la malgranda ŝtala pordo, kaj tremis kiam oni malriglis ĝin. La malgranda viro, sen armiloj, pasis internen kaj brue fermis la pordon malantaŭ si. BOZO donis avertantan fajfkrion de kolero. Sed la entrudulo mallaŭte komencis paroli. Aŭdante la unuajn malmultajn silabojn, la elefanto singarde kvietigis. La streĉita ĉeestantaro ne povis rekoni eĉ unu vorton; ŝajnis, ke sole BOZO komprenas la lingvon.

La grandega korpo, restis rigida, kvazaŭ paralizita, dum, per dolĉa tono, la voĉo daŭris paroli. Poste, BOZO eligis malgrandan infanan kortuŝan krion. La grandega kapo komencis svingi de flanko al flanko. Irante pli apuden, la nekonato frapetis la longan rostron. Kun la fino volvita ĉirkaŭ sia manradiko, li malrapide komencis promeni kun la ele-

(daŭrigo sur paĝo 23).

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

**Franco:** Notu la novan adreson de la perantino:

Mme L. Giloteaux Topor von Waldowski, 8-ter rue de Soubise, 25, cour St. Jean, ROUBAIX (Nord).

C.C.P. Lille 1061.46.

Francaj partoprenontoj en l'Aquila povas pagi la kongreskotizon al ŝi. Kalkulu: 1 liro = fr. 0.60.

Karavano estos eventuale organizata al IJK. Respondeculo Yves Peyraut, 10, rue St. Michel, SAINTES (Charente Maritime).

La abonkoto por 1955, estas fiksita je 300 frankoj. Ĝi rajtigas al rabato por l' Aquila.

**Nederlando:** La nederlanda sekcio de TEJO organizos pentekostan kunvenon en Putten. Restadkosto  $\pm$  6 guld. En ĉi sumo estas enkalkulita: 2  $\times$  tranoktado, 1 varma manĝo,

+ teo, aŭ kafo. (Panon kunportu). El la programo: Festvespero, ekskurso al la Uddelermeer, JARKUNVENO.

Skribu al: Ben van Moors, Eendrachtspark 19, BUSSUM.

Ankaŭ eksterlandanoj estas bonvenaj.

**Al ĉiuj perantoj:** Ni ĉiuj scias, ke la nuna administrado ĉe TEJO estas pli-malpli nebula. La nova estraro ĉion eblan faras por doni la aferojn en bonan ordon. **Landaj perantoj kunhelpu kaj sendu viajn adreslistojn laŭ eble en du ekz. al la administrado.** Aldonu apartan liston pri la pagintaj TEJO-anoj por la kasisino. **Ĉiun TEJO-monon, kiu estas ankoraŭ ĉe vi, bonvole sendu kiel eble plej baldaŭ per internacia poŝtmandato al la redaktoro-kasistino.**

---

## LA IJK EN L'AQUILE,

de la 7a ĝis la 13a de aŭgusto 1955.

**Adreso:** Sro G. Bronzetti, Via San Martino 8, l'Aquile (Abruzzi). Nepre aldonu respondkuponon, se vi deziras ricevi personan respondon. Cetere vi trovos ĉiumonate en LJV la plej freŝdatajn informojn. Ne prokrastu vian anoncon, aliĝu kiel eble plej baldaŭ.

**Atentu!** Aliĝo validas nur kun samtempa pago de 2000 liroj. Pagu ĝin al la landa peranto, se vi ne povas ĝin sendi al Italujo.

Estas neeble informi ĉiujn landajn aliĝontojn pri la kurzo de la respektivaj landoj. Informiĝu en via propra lando ĉe iu banko pri la kurzo de via mono kompare la italan liron. Estas

afero malmultekosta kaj vi samtempe povas elkalkuli la diversajn eblecojn.

**Pripensu!** Preskaŭ ĉiuj Esperantistaj organizoj kolektas. TEJO neniam ĝenas vin. Vi ĉiuj bone scias, ke TEJO havas multe da ŝuldoj ĉe la presisto. Konsideru ĝin via morala devo veni grandnombre al l'Aquile por ke TEJO ricevu kiel eble plej altan sumon por liberigi de la ŝuldo.

LA IJK NE ESTAS AFERO NUR DE L.O.K. DE LA RESPEKTIVA KONGRESO, SED ĜI ESTAS AFERO DE LA TUTA TEJO, DO ANKAŬ DE VI.

1. **Dek? Dentoj?** Mi loĝas en urbo kiu havas la nomon DENTON. Oni diras ke la signifo de la nomo Denton estas „Urbo de la Danoj”. La nomo de la loka Esperantista grupo estas „La Dentona Esperanta Klubo” aŭ mallonge „DEK”. Kompreneble „Denton” havas alian signifon esperantligve kaj oni ofte ŝercas pri ĝi. Ekzemple iufoje vizitanta prezidanto diris ke la Dentonaj Esperantistaj havas fortan „DENTON”! Do, mi decidis skribi „DEK DENTOJN” kaj dissendi ilin tra la mondo por helpi nian movadon.

2. **Mi.** Mi estras grandan lernejon nove konstruitan. Mi prizorgas 940 geknabojn (inter 11 kaj 15 jarajn), 37 geinstruistojn, 15 purigistinojn kaj 3 zorgistojn. Ankaŭ estas 12 kuiristinoj kaj helpantinoj. Por helpi min estas nur unu sekretariino. Ni ricevas ĉiujare almenaŭ 2,000 leterojn kaj ni elsendas ĉirkaŭ 1,500. Ni kolektas de la geknaboj pli ol £ 6,000 ĉiujare. Jes, vi bone komprenos ke ĉe mia lernejo estas multe da laboro.

Ankaŭ mi estas patro kaj avo. En tiu rilato mi ĉiam estas treege okupata. Verŝajne mi priskribos mian familion en sekvonta dento.

Pro tio ke mi estas tiom okupata, mi estas malbona korespondanto kaj kredeble malkuraĝigas miajn plumamikojn. Se vi estas aŭ estis korespondanto mia mi petas vian pardonon.

Mi esperas ke pere de miaj „Dentoj” mi kontentigu miajn multnombrajn Esperantistajn geamikojn, kaj samtempe helpu Esperanton ĉi tie.

3. **La unua mordo.** Mi jam diris ke mia lerneja konstruo estas nova. Ĝia kosto estis ĉirkaŭ £ 240,000. Estas 159 apartaj ĉambroj kaj la longeco

de la koridoroj estas 600 metroj. Ĝia halo estas la plej granda ĉambro en la urbo kaj povas enhavi inter 700 and 800 seĝojn. Laŭ kutimo, oni invitas eminentulon por oficiale malfermi novan lernejon kaj la regantaro de la lernejo jam invitis The Right Honorable Chuter Ede M.P. esti la „Oficiala Malfermanto”. **La ceremonio okazos vendredon la 18an de marto 1955** kaj multaj aliaj eminentuloj ĉeestos. S-ro Ede estas tre impona persono, membro de la Brita Labora Partio. Li estis „Home Secretary” en la lasta Registraro.

Mi decidis starigi specialan ekspozicion de salutkartoj kaj diverslingvaj lernolibroj de la tuta mondo kiel parto de la oficiala malfermo, kaj mi petas vian helpon. Mi sendos rekompencan al ĉiu kiu helpos min. En la lernejo estas belega biblioteko kiu enhavas multajn Esperantajn librojn. Mi deziras starigi konstantan ekspozicion de lernejoj libroj, tipaj libroj uzitaj de la infanoj de la tuta mondo.

4. **Esperanto.** Esperanto estas deviga temo por ĉirkaŭ pli ol 200 geknaboj en mia lernejo. Mi enkondukis la instruadon de Esperanto antaŭ ses jaroj kiam mi mem Esperantistiĝis. Unue estis forta kontraŭstaro sed iom post iom kun la helpo de multaj amikoj, esperantistoj kaj nesperantistoj, ni venkis la antaŭjuĝecon. Sed ankoraŭ restas du malfacilaĵoj, kompetentaj instruistoj de la lingvo kaj taŭgaj lernolibroj. Moĝo ne mankas, ĉar nun la instruado estas laŭ oficiala permeso kaj la edukada aŭtoritato pagas por la libroj, sed ŝajnas al mi ke taŭga lernolibro por angla popollernejo ne ekzistas. Do mi decidis verki lernolibron (eble mi devis diri verkigi an-

stataŭ verki ĉar kelkaj pli spertaj instruistoj de Esperanto kunlaboros pri ĝi). Mi jam ekkolektis ideojn por la libroj, historietojn, poemojn, ekzercojn, ludojn k.t.p. Mi volas ke la libro enhavu internacian vidpunkton kaj desegnojn aŭ bildojn de diversaj landoj, tradukojn de naciaj infanpoemoj kaj kantoj. Mi serĉas multe da helpo tiurilate.

5. **Karavano eksterlanden.** Kvinfoje mi organizis karavanon por viziti internacian kongreson jene: Konstanz (TEJO 1950), Haarlem, (TEJO 1951) Ry, Danlando (TEJO 1952), Wörgl (TEJO 1953) kaj Haarlem (UK 1954). Ĉiujare ni vojaĝis per propra aŭtobuso. Kelkaj geknaboj kaj junuloj deziras partopreni la IJK-n de TEJO en l'Aquile, sed la vojaĝo estas tre longa kaj multekosta. Mi ankoraŭ provas fari taŭgan aranĝon eble per vagonaro. Se ne eblos iri al l'Aquile ni iros al alia internacia kunveno, kongreso, aŭ fe-

rio. Plaĉos al mi aŭdi pri alternativa aranĝo.

6. **Niaj filmoj.** Dum kvar jaroj mi faris filmojn de nia eksterlanda vojaĝo. La unuaj du estis blankajnigraj. Bedaŭrinde juna knabo ŝtelis kaj tute detruis ilin. La lastaj du estas koloraj kaj multe pli sukcesasj. Mi kunportos ilin, kiam mi vojaĝos eksterlanden kaj estos preta montri ilin. Por tio necesos havigi taŭgan aparaton per kio oni povas montri 16 mm filmon. Mi ne povas sendi la filmon, ĉar mi havas nur unu ekzempleron kaj kompreneble ĝi estis tre multekosta.

7. **Korespondantoj.** Mi deziras kolekti tipajn erarojn faritajn de infanoj kiam ili unue lernas Esperanton. Pro tio mi estas preta korespondi kun infanoj kiel „Angla Onklo” kaj ankaŭ akcepti listojn de eraroj, kolektitajn de aliaj instruistoj. Mi ankaŭ interesigas pri la temoj, pri kiuj infanoj tre ŝatas legi kaj skribi.

Norman Williams,  
237 Two Trees Lane,  
DENTON, M/C, Anglujo.

---

(daŭrigo de paĝo 20).

fanto ĉirkaŭ la kaĝo ĝis la miregigita ĉeestantaro ne plilonge povis toleri la silenton kaj aklamis. Fine la malgranda viro forlasis la kaĝon.

„Estas nenio malbona en BOZO”, li diris al la estro. „Li estis nur hejmsopira. Mi parolis al li en „Hindustani” ..... li estas Hinda elefanto kaj tio estas la lingvo, kiun li ĉiam aŭdis kiam li estis juna. Ĝi trankviligis lin denove. Li estos tute kvieta

nun dum longa tempo. La nekonato ŝajne ne vidis la etenditan manon de la direktoro ..... eble ne plaĉis al li premi manojn kun viro, kiu volonte vendis biletojn al la mortigado de elefanto. Li simple malaperis.

La direktoro, rigardante la leĝan liberigon, rigardis la subskribon. Post tio, li komencis kompreni. La nomo estis

Rudyard Kipling.

## MI DEZIRAS ENIRI LA ALTAN LERNEJON.

Jasuda-Kijoko (15 j., knabino).

Post dek kvin tagoj mi finos la kurson de la meza lernejo. Estonte mi fariĝos terkulturistino, tion mi jam klare decidis. Tamen pro tio, ĉu mi eniru aŭ ne eniru la pli altan lernejon, pri tio mi konsiliĝas kun la patrino, hodiaŭ vespere ankaŭ.

— Ĉu eniri la altan lernejon estas bone?

— Ankoraŭ denove pri tiu afero? Tio al mi faras kapdoloron!

Mi embarasiĝas ne povante decidi kiel fari, kvankam tio estas mia propra afero.

— Ĉu vere ci volas fariĝi kamparanino, aŭ pro kompato al mi, la patrino, nur tiel diras?

— Mi vere tiel pensas. Vere mi volas fariĝi kamparanino.

— Se tiel estas, ne estas necese eniri la plialtan lernejon, mi pensas.

— Tamen, fininta la mezan lernejon, al mi ĉio sufiĉas?

— Jen, vidu min. Mi ne povas skribi pli ol mian nomon, tamen mi fariĝis plene kapabla kamparanino.

— De nun la mondo estos alia ol antaŭe.

— Kiel mi ĉiutage parolas al ĉi, post cia fino de la lernejo, tuj mi cin sendos al ekzercado, de vest-kudrado, tio daŭros ĝis Majo, kiam komenciĝos printempa silkkulturo, kaj poste en Decembro kiam tute finiĝos la rikolto, mi sendos cin por lerni eŭropstilan vestfaradon ĝis venonta Majo, kaj plu, kiam estos liberaj tempoj mi lernigos cin pri la florarangado, teksado, kaj tiel plu. Sufiĉe ellerninte metiartojn de virino, ci edziniĝu je ordinara kamparano, jen estas mia espero.

— Tiuj lerno-ekzercaĵoj estas tre necesaj, tamen pli multe studi, kaj fariĝi tre bona kamparanino, jen estas mia deziro.

— Se ci volas eniri la plialtan lernejon, ci ne fariĝu kamparanino, kaj fariĝu sinjorino salajrjulo-edzino.

— Neniel; mi tion ne volas. Mi fariĝos kamparanino.

— Se ci eniros la lernejon, kamparano ne edziĝos je ci. Ne plene kapabla je virinaj metiartoj, kaj nur havi kapon plenan de scioj, tiu utilas nenion. Pensu, antaŭ ĉio, dum kamparanaj viroj ne iras al la alta lernejo, kiu el ili edziĝos je virino kiu eliris el la alta lernejo?! Jen kial mi ne deziras enirigi cin en la lernejon, ne estas pro tio ke mi volas servigi cin kiel servistino ĉe la domo. Ĉu ci komprenas? Mi volas morti vidinte la lokon, kie ci mortos. Mi deziras vidi cian tutvivan kunulon. Ankaŭ mi jam ne povos longe plu vivi, almenaŭ en printempo de cia dudek jara aĝo mi volas festi cian edziniĝon. Mi pensadas nur tion.

Mi jam ne povis paroli plu. La patrino ankaŭ senforte fermis okulojn.

(En Japanaj vilaĝoj, al la knabinoj estas tre malfacile ricevi altan edukadon, pro la kaŭzo de malnova labor-maniero de terkulturado kaj malnova moro de familia sistemo. Ili estas destinitaj baldaŭ edziniĝi kaj fariĝi kamparaninoj post fino de la devigita elementa edukado. Pli edukitaj virinoj ne povas facile edziniĝi kun kamparanoj).

El: Japana Lando kaj popolo.

## LEGENDO PRI LA MONTA SANKTA-MIKAELO.

El „La Normandaj Rakontoj” de Guy de Maupassant,  
tradukis: Roland Dupuis, Stockholm.

Mi vidis ĝin unue el Cancalle, tiun feinokastelon kvazaŭ plantitan en la maro. Mi vidis ĝin malprecize, kiel grizan ombron starantan en la nebula ĉielo. Mi ĝin revidis el Avranches ĉe la sunsubiro. La vastega sablejo estis ruĝa, la horizonto estis ruĝa; nur la kruta abatejo konstruita tie malproksime de la kontinento kvazaŭ fantazia nobelkastelo, mireginda kiel songpalaco, neimageble stranga kaj bela, restis preskaŭ nigra tra la purpuraj nuancoj de l' mortanta tago.

Mi iris al ĝi jam ĉe la tagiĝo la morgaŭtan tagon, marŝante nun tra la sabla ebenaĵo, streĉe rigardante tiun monstran juvelon same grandan kiel montaro, ĉizitan kiel kameo kaj vaporan kiel muslino. Ju pli mi alproksimiĝis, des pli mi sentis min transportata de admiro, ĉar nenio en la mondo eble estis pli perfekta kaj pli eksterordinara.

Kaj mi vagis surprizite, kvazaŭ mi malkovris dian loĝejon, tra tiuj ĉambregoj portataj de kolonoj jen pezaj, jen gracilaj, tra la koridoroj skulptitaj kiel puntaĵoj kaj mi levis miajn mirigitajn okulojn al tiuj pintaj turetoj, kiuj similas raketojn direktitajn al la ĉielo kaj al tiu tuta nekredebla miksaĵo de turetoj, gargojloj, graciaj kaj ĉarmaj ornamaĵoj, ŝtona priteknikaĵo, granita punto, kolosa kaj delikata majstroverko arkitektura.

Ĉar mi restis en ekstazo, alvenis kamparano de l'Malsupra Normandio, kiu rakontis al mi la historion pri la granda kverelo de Sankta Mikaelo kun la Diablo.

.....  
Ĉiu vilaĝo de Francujo estas metita sub la patronecon de protektanta sanktulo modifita laŭ la karaktero de la enloĝantoj.

Tiamaniere Sankta-Mikaelo gardadas la Malsupran Normandion, Sankta-Mikaelo, la radiantaj kaj glora anĝelo, la glavbatalanto, la ĉiela heroo, la triumfanto, la venkinto de Satano.

Sed jen, kiel la sud-normando, ruza, insida, malica kaj ĉikanema, komprenas kaj rakontas la luktadon de l'granda saktulo kontraŭ la Diablo.

Por ŝirmi sin kontraŭ la fiagoj de sia demona najbaro, Sankta-Mikaelo konstruis mem meze de la Oceano tiun loĝejon indan al ĉefanĝelo; kaj efektive, nur tia sanktulo povis fari al si tiel grandiozan restadejon.

Sed ĉar li ankoraŭ timis, ke la Maliculo alproksimiĝos, li ĉirkaŭigis sian bienon per moviĝantaj sabloj, pli perfidaj ol la maro.

La Diablo loĝis en humila pajlokovrita domo sur la marbordo; sed li posedis la herbejojn baniĝantajn en sala akvo, la belajn grasajn terojn, kie kreskas pezaj produktoj, ĉiujn riĉajn valojn kaj fekundajn montetojn de la regiono, dum la saktulo regadis nur sur la sablejo. Sekve de tio Satano estis riĉa kaj Sankta-Mikaelo estis same malriĉa kiel ĉifonulo.

Post kelkaj jaroj da fastado la sanktulo enuis pri tiu situacio kaj deziris fari kompromison kun la Diablo; sed la afero ne estis facila, ĉar Satano amis siajn rikoltaĵojn.

Li pripensis dum ses monatoj; kaj iun matenon li piediris al la kontinento. La demono manĝis la supon antaŭ sia pordo, kiam li ekvidis la sanktulon; tuj li rapidis al li renkonte, kisi la malsupron de lia maniko, igis lin eniri kaj proponis al li refreŝigan trinkaĵon.

(daŭrigota).

## La historio de la banano.

La historio de la banano estas pli malnova ol ia skribita historio. La plej frua kroniko, kiun ni posedas, rakontas la jenon:

Kiam la armeoj de „Aleksandro la Granda” en la jaro 327 antaŭ Kristo restadis en Hindujo, tie ili trovis bananarbojn. Sed kredeble bananarboj kreskis tie jam kelkajn jarcentojn pli frue.

La saĝuloj de Hindujo ripozadis en la ombro de la banana plantaĵo; ili refreŝigadis sin per ĝiaj fruktoj kaj tial oni nomis la bananon: „la manĝaĵo de la saĝuloj”.

La banano estis tre grava por la homoj. Kiam ili vojaĝis por ekloĝi en aliaj landoj, ili prenis kun si sekigitajn radikojn de bananarbo por kreskigi ilin apud la novaj loĝejoj. Tiamaniere vojaĝis la banano for de sia unua hejmo en la tropikaj regionoj de Suda Azio al la okcidenta marbordo de Afriko. De tiu loko portis ĝin al la Guinea marbordo la araboj, kiuj estis famaj komercistoj.

Kiam kuraĝaj portugaliaj esploristoj trovis la guinean marbordon en la jaro mil kvarcent okdek du, ili

forportis la bananajn radikojn al la Kanariaj Insuloj, kune kun la afrika vorto BANANA.


Dudek ses jarojn post la „mal-kovro” de Ameriko pere de Columbus, atingis la banano Amerikon kaj kelkajn najbarajn insulojn. Inter tiuj ankaŭ Okcidentan Hindujojn, kiu al ni havigas grandajn provizojn.

Dum tricent jaroj la indiĝenoj de Okcidenta Hindujo kaj Mez-Ameriko ĝuis ĉi tiun bongustegan kaj nutran frukton. La popoloj en Eŭropo tute ne sciis ion pri ĝi.

Iufoje maristoj portis hejmen kelke da bananoj kiel kuriozaĵon, sed malmultaj homoj en Britujo vidis bananon ĝis la jaro mil-naŭcent. Tiam estis kelkaj faskoj da bananoj enportitaj. La bananoj kostis en Anglujo po ses pencoj. Tiutempe havis ses pencoj la saman valoron, kiel nuntempe floreno.

En la jaro mil naŭcent-unu tamen la „Fyffes Line” portis al Anglujo la unuan grandan ŝarĝon el „Okcidenta Hindujo”; tiamaniere ĝi fondis tre gravan entreprenon.

Trad.: Jessie Crosby.



### KORESPOND- ADRESOJ

*Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.*

**Franco:** Louis Chasseraud, 10 Av. Marguerite, ROYAN, Ch. M. resp. per bildk. laŭ dez. al ĉiulanda bildk. montranta ventmuelilon.

**Nederlando:** La red. de LJV petas alsendon de ĉiulandaj porinfanaj Esperantaĵoj. Rekomp. laŭ egalvaloro, evt. per p.m. aŭ libroj, laŭ deziro.